La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-18 n-ro 359

# Saĝtelefono foriganta moskitojn. Ĉu ĝi funkcias?




Birmo: la birma armeo estas akuzata pri ĝeneraligitaj seksperfortoj kontraŭ rohingjaj virinoj

Sekureca Konsilio de UN ne povis adopti rezolucion pri enketo de kemiaj atakoj en Sirio

Tra la dentoj videblas la japana socio

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉёnkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

Birmo: la birma armeo estas akuzata pri ĝeneraligitaj seksperfortoj kontraŭ rohingjaj virinoj
*Raporto de Human Rights Watch p. 03*

Sekureca Konsilio de UN ne povis adopti rezolucion pri enketo de kemiaj atakoj en Sirio
*Unu el la negativaj voĉoj venis el Rusio p. 04*

Zimbabva eksprezidento alvokis formi transiran registaron
*Trakti la politikan senelirejon p. 04*

Saĝtelefono foriganta moskitojn. Ĉu ĝi funkcias?
*Ultrasonaj ondoj p. 05*

Tra la dentoj videblas la japana socio
*Sano, riĉeco kaj loĝantaro p. 06*

Belartaj Konkursoj de UEA en 2018
*68-a okazigo p. 08*

Nova versio de *Mozilla Firefox* ankaŭ en Esperanto
*Duoble pli rapida p. 09*

Hodiaŭe
*Jorge Camacho; kaj Rumanio p. 09*

# Birmo: la birma armeo estas akuzata pri ĝeneraligitaj seksperfortoj kontraŭ rohingjaj virinoj

*Human Rights Watch* akuzas ĉi-ĵaŭdon [16 nov 2017] la birmajn sekurecajn fortojn, ke ili sisteme seksperfortadis virinojn kaj junulinojn, kadre de sia represia [persekuta] kampanjo kontraŭ la islama malplimulto Rohingjoj, dum la lastaj tri monatoj.



La raporto publikigita de la organizaĵo pri la homaj rajtoj, bazita en Novjorko, konfirmas la akuzojn kontraŭ Birmo, jam formulitajn de Pramila PATTEN, speciala reprezentantino pri la temo de seksperfortoj dum konfliktaj periodoj.

Pramila PATTEN opiniis, ke la seksperfortoj kontraŭ la Rohingjoj estas «ordonitaj, kunordigitaj kaj plenumitaj de la birmaj armeaj fortoj». Ŝi anoncis sian decidon submeti la aferon ĉe la Internacia Punkortumo.

Lundon [13 nov 2017], la armeo dementis la ekzistadon de tiaj krimoj, certigante ke ĝiaj propraj enketoj trovis nenion tian.

La stabo anstataŭigis la generalon taksitan pri la militaj operacoj en la Ŝtato Raĥino. Tiuj ĉi okazigis formigradon de pli ol 600 000 Rohingjoj (senpatriaj islamanoj) al najbara Bangladeŝo de post fine de aŭgusto.

**«Virinoj perforte vunditaj kaj traŭmatizitaj»**

En sia raporto, *Human Rights Watch* mencias, ke en 52 virinoj kaj junulinoj el la islama rifuĝinta malplimulto en Bangladeŝo, kun kiuj la enketistoj interparolis, 29 asertas, ke ili estis seksperfortitaj, plejparte viktimoj de kolektivaj seksperfortoj.

«Seksperforto estas elstara kaj detruiga aspekto de la kampanjo de etna purigado de la birma armeo kontraŭ la Rohingjoj», skribas Skye WHEELER, aŭtorino de la raporto. «La agoj de barbaraj perfortoj de la birmaj militistoj postlasis sennombreblajn virinojn perforte vunditajn kaj traŭmatizitajn».

*Human Rights Watch* petas la Konsilion pri Sekureco de UN, ke ĝi enkonduku embargon pri armiloj kontraŭ Birmo, kaj aranĝu specifajn punojn kontraŭ la militaj estroj, kulpaj pri tiuj ekscesoj.

Pasintan lundon, la dekkvin landoj petis de la Birma registaro, «ke ĝi evitigu ĉian novan ekscesan uzadon de la militaj fortoj en la Ŝtato Raĥino» kaj de la ĝenerala sekretario de UN, António GUTERRES, ke li redaktu raporton antaŭ la fino de la estontaj tridek tagoj.

Neniam Milito Inter Ni

# Sekureca Konsilio de UN ne povis adopti rezolucion pri enketo de kemiaj atakoj en Sirio

La rezolucio skizita de Usono pri renovigo de la mandato de la Komuna Enketa Mekanismo de la Organizo pri Malpermeso de Kemiaj Armiloj kaj la enketo de la UN pri kemiaj atakoj en Sirio, ne povis esti adoptita de la Sekureca Konsilio de la Unuiĝintaj Nacioj ĵaŭde [16 nov 2017].



La rezolucio ricevis 11 pozitivajn voĉojn kaj 2 negativajn, kun du sindetenoj. Sed ĉar unu el la negativaj voĉoj venis el Rusio, konstanta membro de la konsilio, la rezolucio ne povis esti adoptita. Ĉinio sin detenis de la voĉdono.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Zimbabva eksprezidento alvokis formi transiran registaron

Joice MUJURU, zimbabva eksa vicprezidento kaj ĉefo de la Nacia Popola Partio, ĵaŭde [16 nov 2017] kunvokis gazetaran konferencon, alvokante formi transiran registaron konsistantan el ĉiuj koncernataj partioj por trakti la politikan senelirejon.



Ankaŭ eksa ĉefministro kaj prezidanto de la Movado por Demokratia Ŝanĝo Morgan TSVANGIRAI okazigis gazetaran konferencon, esprimante malferman sintenon pri starigo de transira registaro antaŭ venontjara prezidenteca elekto.

MUJURU faris nenian komenton pri la agado de la zimbabva armeo kaj estis kontenta pri sensanga agado. Ŝi urĝis ĉiujn rilatajn partiojn sin deteni maksimume por realigi pacon. Ŝi opiniis, ke disvolviĝo de la politika situacio postulas, ke Zimbabvo formu transiran organon por konvene solvi ekonomiajn malfacilojn kaj demandojn, inkluzive de reformo de la sistemo pri prezidenteca elekto.

Yu
Ĉina Radio Internacia








## Saĝtelefono foriganta moskitojn. Ĉu ĝi funkcias?

Forgesu pri kontraŭinsektaj kemiaĵoj - La kompanio *LG* antaŭ ne longe prezentis saĝtelefonon, kiu malallogas [forlogas] moskitojn uzante sonajn ondojn. La ekskluzive prezentita en Barato saĝtelefono K7i entute estas kutima telefono kun 5-cola ekrano, 2GB da labormemoro kaj 16GB da konstanta memoro. Tamen ĝia kapablo malallogi moskitojn elstarigas ĝin inter aliaj disponaĵoj. La saĝtelefono K7i ellasas ultrasonon, kiu supozeble forflugigas la ĉagrenitajn moskitojn el la spaco ĉirkaŭ la disponaĵo.

Ĉi-kapablo, nomata angle *Mosquito Away* [Moskito, for] antaŭe jam estis instalita en klimatizilojn, lavmaŝinojn kaj televidilojn. Laŭ informo de *LG*, la ultrasonaj ondoj estas tute sendanĝeraj por homoj. Aldone la teknologio estas silenta, senodora kaj ankaŭ uzantamika. Nuntempe ĝi estas vendata kontraŭ 7 990 rupioj aŭ 121 dolaroj.

Bedaŭrinde ne estas klare ĉu vere la teknologio funkcias. La *BBC* ekzemple asertas, ke tio estas mito. Laŭ aserto de Bart KNOLS, la entomologo, kiu prezidas la konsilan grupon de la Danlanda Malaria Fonduso, "ne estas sciencaj pruvoj", ke moskitoj povas esti forflugigataj per ultrasona teknologio.

Se ĝi tamen funkcias, tio povas havi gravajn aplikeblojn. Proksimume duono de la tutmonda loĝantaro havas riskon esti infektita de malario. En la jaro 2015 estis registritaj 212 milionoj da kazoj de malario, kiuj rezultiĝis en 429 000 mortojn. Per preventado kaj kontrolagado kvanto de mortoj pro malario tutmonde malpligrandiĝis je 29 procentoj ekde la jaro 2010. Tamen parazito, disvastigata de moskitoj daŭre estigas riskon por homoj, ĉefe loĝantaj en triamondaj landoj.

Kirill NOVIĈENKO
Interalie

# Tra la dentoj videblas la japana socio

**20 dentoj en la aĝo de 80 jaroj**



Jam de 15 jaroj mi neniam vizitis kuracistojn, ĉar mi kredas, ke subkorpa baniĝo (matene kaj antaŭ enlitiĝo mi baniĝas entute du horojn por varmigi mian suban korpon) solvas ĉian malsanon, kaj ne multe kredas kuracistojn. Tamen mi vizitas kiel escepto dentiston, ne pro malsanaj dentoj, sed por kontroli la staton de miaj dentoj, ĉar mi kredas, ke dentoj estas la plej gravaj por mia sano. Ja mi havis kelkajn malsanajn dentojn antaŭ 30 jaroj, sed tiuj jam estis kuracitaj kaj nun mi havas sanaj 32 dentojn. Kiam mi vizitas la kuraciston, mi ĉiam demandas lin, ĉu mi povos havi minimume 20 dentojn, kiam mi estos 80-jara, kaj la respondo estas ĉiam "Certe". Kial 20 dentojn en la aĝo de 80 jaroj?

La ministerio de bonfarto lanĉis sloganon «80-jaruloj havu minimume 20 dentojn» en 1989. Se homoj havas 20 dentojn, ili havas neniun problemon maĉi manĝaĵojn, sekve ili povas havi agrablan vivon.

En 2016 la ministerio enketis pri la stato de dentoj inter 3 820 homoj ekde 1-jaraj infanoj ĝis maljunuloj. La rezulto montris, ke 80-jaruloj kun minimume 20 dentoj superis 50% la unuan fojon.

75-79-jaruloj : 56,1 % (8,5% pli ol antaŭ 5 jaroj)
80-84-jaruloj : 44,2% (15,3% pli ol antaŭ 5 jaroj)

Laŭ la ministerio la kialoj estas:

1. multiĝo de dentopastoj, kiuj fortigas dentojn.
2. pli da konscio pri la graveco de dentoj.

Fakte pli multaj homoj brosas la dentojn pli ol 2 fojojn ĉiun tagon.

**1 800 gelernantoj havas «detruitan buŝon»**

Dum maljunuloj fariĝas pli sanaj rilate al la dentoj, 1 800 gelernantoj en la gubernio Hjoogo havas «detruitan buŝon». La asocio de dentistoj en Hjoogo trovis 346 gelernantojn en 97 mez- kaj element-lernejoj, kiuj suferas pro «detruita buŝo», kaj laŭ tiu ĉi cifero la asocio konjektas, ke 1 800 gelernantoj suferas pro tio en la gubernio. Tiuj gelernantoj:

1. havas pli ol 10 malsanajn dentojn, aŭ
2. perdis plurajn dentojn, aŭ
3. havas malfacilon maĉi.

Kaj iliaj vivkondiĉoj estas:

37,1 % de ili vivas nur kun patrino aŭ patro
32,0% de iliaj familioj havas financan malfacilon
33,0% de iliaj gepatroj ne bone zorgas pri ilia sanstato.

La asocio klarigis, ke la tendenco estas sama en ĉiuj gubernioj kaj ke tio estas kaŭzita de malriĉeco.

*Malmultiĝas naskiĝoj*

En 2016 naskiĝis 976 979 beboj, 28 698 malpli ol en 2015. Unuan fojon la nombro ne atingis milionon.

Kiam mi naskiĝis en 1941, naskiĝis 2,5 milionoj da beboj, kaj kiam mia filo naskiĝis en 1966, naskiĝis preskaŭ du milionoj, sed kiam mia nepo naskiĝis en 2010, naskiĝis nur unu miliono. Tre kaj tro da drastaj ŝanĝoj.

Unu el la kaŭzoj de malmultiĝo de naskiĝoj estas malmultiĝo de geedziĝoj. Jen la statistiko:



1970: 1 029 405 geedziĝoj
1980: 774 702
1990: 722 138
2000: 798 138
2009: 714 000
2016: 620 523

La geedziĝoj en 2016 estas la plej malmultaj post la dua mondmilito. Multaj homoj volas geedziĝi kaj havi infanojn, sed pro financa problemo ili ne povas. Multaj devas labori malstabile kun jarkontakto aŭ partatempe, timante eblan maldungiĝon, do al ili mankas mono, sekve ili ne kuraĝas geedziĝi.

Naskiĝoj pli kaj pli malmultiĝas, male mortoj pli kaj pli multiĝas. Nun mortoj estas pli multaj ol naskiĝoj. En 2015:

Naskiĝoj 1 005 677
Mortoj 1 290 444

Japanio jam komencis ŝrumpi. Laŭ la prognozo de la registaro la loĝantaro de Japanio jene malmultiĝos:

2016: 126 597 000
2030: 116 618 000
2040: 107 276 000
2050: 97 076 000
2060: 86 737 000

La terglobo havas tro multe da homoj, do ĝi dankas al Japanio. En la jaro 2050 ni ankoraŭ baraktos pri la detruita nukulea centralo de Fukuŝima. Ankaŭ tiun tempon ĉu Japanio havos fortan ekonomion kaj sufiĉan laborforton por solivi la problemon tie? Mi havas grandan timon pri tio. Certe la generacio de mia nepo suferos multe.

**Malfacila estas vivo de dentistoj**

Homoj malmultiĝas, sekve buŝoj malmultiĝas. Sekve ne estas bezonataj multaj dentistoj. En 1990 estis 74 000 dentistoj, sed en 2014, 103 972. Ju malpliiĝas homoj, des pliiĝas dentistoj. Nun la nombro de dentaj klinikoj estas 1,5-oble pli granda ol tiu de oportunaj vendejoj. Subvencio al dentaj kuracadoj restas en la sama nivelo dum la pasintaj 20 jaroj. Oni diras, ke unu el la 5 dentistoj havas malpli ol 3 milionojn da jara enspezo (30 000 eŭrojn), dum averaĝa vira enspezo estas 5 milionoj da enoj. Tial okazas bankrotoj inter dentistoj. Oni kutimas pensi, ke dentistoj estas riĉaj, sed nun tio estas mito.

Ĉiun fojon, kiam mi vizitas mian dentiston, mi vidas nur unu aŭ du klientojn. Mi neniam atendas mian vicon. Li dungas du flegistinojn. Ĉu ne estas malfacile por li pagi salajron al ili? Ĉu li povas profiti? Mi volas, ke mia dentisto estu sufiĉe riĉa, sed por helpi lin, mi ne volas havi malsanajn dentojn.

HORI Jasuo

# Belartaj Konkursoj de UEA en 2018

La Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, unu el la plej gravaj kaj jam klasikaj manifestiĝoj de la E-kulturo, invitas verkemulojn al partopreno en ilia 68-a okazigo. La rezultojn oni anoncos kadre de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono. Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.
Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).
Prozo, subbranĉo mikronoveloj: (maksimuma longo 100 vortoj). Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio Paula Adúriz.
Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita.
Teatraĵoj, subbranĉo monologoj (unupersonaj teatraĵoj) kaj skeĉoj (unu- aŭ divers-personaj): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio María Cuevas.
Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas Premio Luigi Minnaja.
Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2017. Aljuĝata estas nur unu premio.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2018.

Oni sendu po unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Miguel Gutiérrez Adúriz, prefere retpoŝte al la adreso: `sciosfero@gmail.com`; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coteros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio*, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj tri ekzemplerojn al Ionel One( , Centra Oficejo de UEA, *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*.

Premioj: en la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵoj kaj Eseo: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €; Nova Talento 182 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la du subbranĉoj Mikronoveloj kaj Monologoj kaj skeĉoj po 125 €.

Noto: Kiel konstateblas, ĉi-jare eksplice konkretiĝas la ideo diversmedie manifestita de la Prezidanto kaj la Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, ke ili volas potencigi tri ĝenrojn: mikronovelon aŭ mallongan rakonton, ene de la branĉo Prozo, kaj skeĉon kaj monologon (unupersonan ordinare mallongan teatraĵon), ene de la branĉo Teatraĵoj. Unue, por ke la E-beletro ne fremdu al la furoro spertata de tiuj ĝenroj kadre de etnaj literaturoj. Due, ĉar ĉi-ĝenraj kreaĵoj konsistigas materialon plej interesan kaj oportunan por ludado kuntekste de niaj kongresoj kaj renkontiĝoj. Trie, por malfermi la BK-pordojn al kiel eble plej diversa konkursantaro. Atentu tamen, ke la ĉi-jaran enkondukon de ambaŭ subbranĉoj ni faras nur prove. Ilia definitiva aligo al la BK-fakoj dependos de la reago far la BK-partoprenantoj.


Detala regularo troviĝas en la retejo de UEA. La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2017, legeblos en la volumo Belarta rikolto 2017, eldonota de Mondial. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie.

Gazetara Komuniko de UEA, n-ro 718 (2017-11-16)

# Nova versio de *Mozilla Firefox* ankaŭ en Esperanto

La redakcio de *Esperanto Ilustrita* elŝutis kaj ekuzis ĝin. Fakte ĝi estis tute refarita, kaj la fina rezulto ŝajnas pli moderna, efika kaj... rapida.

La 16-an de novembro *Mozilla Foundation* lanĉis la novan version de sia retumilo. Temas pri *Firefox Quantum* (n-ro 57.0). Esperantistoj jam de longe ankaŭ konas ĝin kiel Fajrovulpon.




*Firefox Quantum* estas disponebla en pluraj lingvoj, kaj ankaŭ en Esperanto. Krome ekszistas centoj da programaldonaĵoj, troveblaj ĉi tie. Elekton de esperantigitaj aldonaĵoj de tie oni trovas ĉi tie.

La oficiala reklamo trumpetas, ke tiu versio de la fama aplika programo estas duoble pli rapida, ol ĝia antaŭa varianto. Ĝi uzas 30% malpli da memoro ol *Google Chrome*.

La nova versio de *Mozilla Firefox Quantum* elŝuteblas ĉe la retejo (vidu).

Esperanto Ilustrita

---



## Jorge Camacho

**Jorge Camacho (Cordón) [ĥorĥe kamaĉo] (naskiĝis la 18-an de novembro 1966 en *Zafra*, Ekstremaduro) estas hispana esperantisto kaj Esperanto-verkisto.**

**En Esperanto aperis pluraj verkoj kaj tradukoj.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**Centra Universitato de Bukareŝto kaj statuo de Carol I, Bukareŝto, Rumanio.**

**Vikipedio**